

Christe, precamur adnuas

Brevier-Himno

Ordinara tempo > 1-a kaj 3-a semajno > jaŭdo > horo de la legaĵoj > tage

*Christe, precamur adnuas
orantibus servis tuis,
iniquitas hæc sæculi
ne nostram captivet fidem.*

*Non cogitemus impie,
invidemus nemini,
læsi non reddamus vicem,
vincamus in bono malum.*

*Absit nostris e cordibus
ira, dolus, superbia;
absistat avaritia,
malorum radix omnium.*

*Conservet pacis fœdera
non simulata caritas;
sit illibata castitas
credulitate perpeti.*

*Sit, Christe, rex piissime,
tibi Patrique gloria
cum Spiritu Paraclito,
in sempiterna sæcula.*

Amen.

latina T: Marbordus Redonensis
(1035–1123)

Ni petas, Kristo: Diru jes
al niaj preĝoj kun favor';
por ke la maljustec' de l' mond'
nin ne retenu fidi Vin.

Ne pensu ni kun malpiec',
malgrand-anime, kun envi'.
Anstataŭ venĝi venku ni
malbonan ĉion per la bon'.

El nia koro restu for
orgojlo, fraŭdo kaj koler',
avaro ĉefe kaj avid',
en kiuj fontas ĉiu mav'.

Sincera estu nia am',
ligita al konstanta pac'.
La ĉasto estu sen difekt',
ne ŝanceliĝu nia kred'.

Al Vi, Jesu', plej pia Reĝ',
al Vi, ho Patro, estu glor',
al Vi, Spirito, Paraklet',
honor' eterne kaj ador'.

Amen.

E: Peter Langenecker kaj
Albrecht Kronenberger 2005